

Lucien Bannier kaj Lanti
Claude Gacond, 412-a radioprelego, 1971.09.01 & 04

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi someron ni opiniis nian devon honori la 50-jariĝon de Sennacieca Asocio Tutmonda per prelegaro. La pasintan semajnon ni raportis pri la ĉi-somera kongreso de tiu asocio. Hodiaŭ ni klonkludas tiun temon per citaĵoj el la saluto de Lucien Bannier al la granda familio de SAT.

A.- Lucien Bannier estas oldulo preskaŭ okdek-jaraĝa, kiu konservis sian vigecon. Se li forlasis la gvidadon de SAT, li tamen ankoraŭ okupiĝas pri ties eldonfako, kaj la eldonado de la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* fare de SAT tucerte estas grandparte rezulto de la laboro de tiu energia, kuraĝa kaj realista viro.

Cl.- Lucien Bannier komencis sian saluton parolante pri la naskiĝo de SAT kaj pri la personeco de Eŭgeno Lanti. Ni citas lin :

A.- Tuj post la armistico de novembro 1918 la parizaj esperantistoj elvekiĝis post letargio de kvar jaroj ; rekomenciĝis la kunvenoj. [...] Iom post iom multiĝis la kunvenantoj, sed ne ĉiuj antaŭmilitaj revenis, ĉar granda nombro fariĝis viktimoj de la milito.

Cl.- *Estis tre videble, ke la revenintoj volis tute simple repreni la propagandajn metodojn de 1914. Sed kontraŭis al tiu inklino iu novulo, tiutempe 40-jara. Li vigle ribelis kontraŭ tiu tendenco al rutino. Tiu barbulo, kun eksterordinare fajraj okuloj, estis kamarado Adam, instruisto pri desegnado kaj geometrio ĉe parizaj lernejoj elementaj, kiu kelkajn jarojn poste adoptis la pseŭdonomon Lanti, kiam la Ministro de l'Instruado minacis la ŝtat-oficistojn, kiuj inklinis favore al esperanto, lingvo konsiderata kiel danĝero por la sekureco de l' ŝtato.*

A.- *Palpinte la terenon dum pluraj kunvenoj, Lanti deklaris krude al la pasivaj esperantistoj de Parizo, kiuj iom skandaliĝis pro tiu deklaro, ke esperanto ĉesu esti nur distraĵo aŭ ludo, sed male fariĝu faktoro de revolucio mensa, de transformo de la spiritoj sur la tutmonda skalo.*

Cl.- Poste Lucien Bannier raportis pri sia kunlaboro kun Lanti. Ni ree citas lin :

A.- *Lanti serĉis konsulte ĉirkaŭ si ies helpon. Instinkte du homoj sentis sin logataj al la plano de Lanti, nome Kamarado Glodo kaj mi mem (estas Lucien Bannier kiu parolas), kaj tiu simpatio interne de la Trio daŭris ĝis la malapero de du el la Tri.*

Cl.- *Ne kredu tamen, ke tiuj tri homoj similis kiel ĝemeloj, tute ne! Ĉiu havis sian personecon, sian karakteron, sian specialan kapablon. Fakte, ĉiu el la tri reprezentis tipon apartan de homo, sed la pozitivaj kvalitoj respektivaj de la tri formis tuton perfekte koheran, kiu donis la maksimumon de efikeco al la plano elpensita de Lanti.*

A.- *Evidente Lanti emergis super la du aliaj, dank'al sia genieco, pri kio povis pretendi nek Glodo nek mi (daŭre estas Lucien Bannier kiu parolas). Tamen, kiel ĉiuj homoj, eĉ gigantaj, Lanti havis vakuojn, pri kiuj li cetere konsciis ; Glodo kun sia prudenta sagaco denaska, - mi mem kun miaj modestaj ecoj en administrado, sciis ĝuste ŝtopi tiujn mankojn de Lanti.*

Cl.- En tiu saluto Lucien Bannier raportis pri la ekzisto de interesa manuskripto. Ni ree citas lin :

A.- *Tuj post la morto de Lanti ni ricevis el Meksiko manuskripton relative dikan, kiu portas la titolon **Fredo**.*

Cl.- *Fakte tiu biografio priskribas detale la propran vivon de Lanti ekde la naskiĝo. Laŭ tiu aŭtobiografio aperas, ke Lanti, ekde siaj unuaj jaroj, ne estis facile manipulebla. Per sia*

Lucien Bannier kaj Lanti
Claude Gacond, 412-a radioprelego, 1971.09.01 & 04

obstina malobeado al la kutimoj kaj tradicioj, li kaŭzis pli da ĉagreno ol da ĝojo al sia patro, sia patrino kaj sia fratino. Li ne ŝatis sian patron, kiu drinkis tro da cidro, sed male tre amis sian patrinon.

A.- Ni tre esperas povi foje citi erojn el tiu manuskripto dum radioprelegaro.

Cl.- Lucien Bannier en sia saluto raportis pri la krizaj periodoj de SAT, kaj poste li revenis al la personeco de Lanti. Ni ree citas lin :

A.- La plej reliefa trajto el la personeco de Lanti estis lia kapablo percepti, instinkte aŭ dedukte, en la estonton, foje en foran estonton, la evoluon, progrese aŭ regrese, de sistemo socia. Multaj el la grandaj eventoj okazintaj dum la ĵusaj jardekoj demonstris la ĝustecon, la pravecon de la prognozoj de Lanti. Oni trovis ĉe li kuriozan miskson de eksterordinaraj inteligento kaj memorkapablo.

Cl.- Lucien Bannier poste rememorigis, ke la plej bela produkto el la meditado de Lanti estis, en 1930, lia iniciato pri la *Plena Vortaro de Esperanto*.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-